

# KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO 1<sup>a</sup> : APRILO 1921

# KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

OFICIALA ORGANO DE "KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO"

JARKOTIZO: 5 PESETOJ

---

---

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: CARMÉ, 30 - BARCELONA

---

---

## REDAKTOROJ

JAUME GRAU, ĈEF-REDAKTORO

S. ALBERICH JOFRÉ

ARTUR DOMÈNECH

ROMÀ GUARDIET

---

ĈIUJN VENDREDOJN, JE LA 10<sup>a</sup> VESPERE, OKAZAS REDAKCIA KUNVENO.



Nia devizo: *Maro estas gutaro*

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

**Kataluna Esperantista Federacio**

Redakcio kaj Administracio :  
Carme, 30 : BARCELONA

## Esperantistaj Kunvenoj

**N**IAJ enlandaj samideanoj pretiĝas — ĉiu laŭ sia povo, kompreneble — al la ĉeesto de tri Esperantistaj kunvenoj: la Dua Diskuta Kunveno de Esperantistoj de Iberiaj Landoj, okazonta en Zaragoza la tagojn 26-27-28 Majo 1921, kiu celas la organiziĝon de ĉiuj Iberlandaj samideanoj; la XIII.<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto, en Praha, dum venonta Aŭgusto; kaj la IX.<sup>a</sup> Kongreso de Kataluna Esperantista Federacio en Girona, dum la tagoj 15-16-17 Oktobro 1921.

En la proksima numero ni dediĉos specialan atenton al tiaj okazontaĵoj, detale raportante pri ili; ĉefe ni pritraktos la celon de la Kunveno en Zaragoza, el kiu sendube eliros la granda Konfederacio kunliganta la esperantistojn el ĉiuj landoj de la Ibera duoninsulo.

Ni, katalunaj samideanoj, plej intense partoprenos la Zaragozan Kunvenon.

## Problemo urĝe solvota



La rapida disvolviĝo de nia movado tra la tuta mondo en la nunaj tempoj prezentas (precipe en nia lando, kie la revigliĝo de esperantismo estas tiel ĵusa, sed ankaŭ tiel intensa kaj promesplena) kelkajn problemojn kies solvon urĝe devas entrepreni la esperantaj organizaĵoj, se oni volas profiti la tutan nunan entuziasmon kaj alkonduki al fruktodona rezultato la agadon de grupoj kaj laboremaj esperantistoj.

Inter aliaj kies elmontron per sekvontaj artikoloj mi intencas, reliefigas per sia graveco kaj urĝeco unu kiun nun mi elektas kiel temon, kun la deziro ke ĝi altiru la atenton de tiuj kleruloj kapablaj solvi ĝin kaj de ĉiuj esperantistoj interesigantaj je la plena kaj efika agado de niaj propagandaj institucioj: tiu de la *esperanta profesorado*.

Manko de profesoroj, jen la ĉefa aspekto de la problemo. Kiu ja nescias ke kontraŭ la kreskanta disvolviĝo de nia afero stariĝas kiel nesuperebla baro la neebleco trovi decajn lertajn personojn kapablajn gvidi la instruadon de Esperanto por multegaj societoj dezirantaj enkonduki ĝin en siajn rondojn? Kiom da belaj kampoj restas nekulturitaj pro manko de laboristoj! Kiom da semoj perdiĝas, tial ke la dissemadon ne postiras lerta kulturisto prilaboranta la rikoltadon! Estas sennombraj la laboristaj sindikatoj, teknikaj korporacioj, sciencaj akademioj, politikaj, religiaj kaj sociaj sferoj, kie esperantemo iam elmontriĝis, sed bedaŭrinde ne ekfloris, spite la bondeziroj de la propagandistoj, pro la nura sama kaŭzo: manko de profesoroj.

Tiun mankon mi atribuas unue al laciĝo de la malnovaj pioniroj kiuj, post sia antaŭtempa vigla laborado, iom post iom kaj unu post la alia, ĉesis sian agadon kaj nun restas ankoraŭ kvaŭzaŭ dormantaj, indiferentaj al nuna revigliĝo. El ili plejparte dependas ke la problemo plisimpliĝu: se ili denove sin donos al aktiva apostolado, tute certe iliajn paŝojn sekvos arego da entuziasmaj disciploj, kiuj nur bezonas la garantion de ilia bonfamo

por sin ĵeti kuraĝe al konkiro de novaj kampoj kaj la instigon de ilia ekzemplo por ne ŝpari siajn energiojn kaj sindonemon.

Due tiun mankon oni devas atribui al ĝis nun ne okazigo de specialaj kursoj por aspirantoj al profesoreco. Tio ĉi estas grava punkto. Kiom da entreprenoj disfalis, kiom da promesplenaj komencitaj kursoj malsukcesis, pro nesufiĉa lerteco de siaj entreprenintoj kaj gvidantoj! Estas urĝe necesa la starigo de speciala profesora organismo kun senĉesa aranĝado de superaj kursoj kaj zorga aljuĝado de titoloj rajtigantaj la profesoradon. En nia K. E. F. ekzistas jam de antaŭlonge profesora korpuso, sed ĝi, laŭ mia opinio, bezonas reorganizadon; ĉar ne ĉiuj al ĝi apartenantaj titolitaj profesoroj, kvankam bone posedantaj la lingvon, nun kapblas gvidi kursojn kaj, kontraŭe, kelkaj spertaj kaj laboremaj kursogvidantoj ne posedas la titolan rajtigilon, kies aljuĝon, aliparte, nur supera organismo asesorata de lingvokomitatoj devus rajti.

Aliajn diversajn kaŭzojn kaj aliajn diversajn aspektojn de la problemo mi povus ankoraŭ elmontri, sed sufiĉe, mi kredas, mi jam pruvis ke la problemo ekzistas, por ke ĉiuj konsentu kun mi pri la urĝa neceseco de ĝia tuja solvo. Ni serĉu rimedojn; ni revekigu la apostolemon de niaj antaŭaj pioniroj; ni altiru al niaj vicoj ĉiujn laboremulojn restantajn ankoraŭ ekster nia federacia organizaĵo; ni konsiliĝu kun niaj lingvokomitatoj pri la reorganizado de la profesorado de K. E. F. Nur tiel ni evitos la riskon ke iu ajn simpla grupeto iam konsistigu ne rajtigitan tribunalon uzurpantan la liveradon de profesora titoloj; nur tiel ni baldaŭ povos kulturi la bone sterkitajn kampojn kiujn la revigligo de esperantismo en nia lando malfermas al niaj laboroj.

ARTUR DOMÈNECH



## La Urbo<sup>1</sup>

Devizo: Sopiro



OST la Kandelfesto, ĉiujare Laŭrenco veturis Barcelonon por enspezi la renton de mono kiun li havis en akcioj de tiu fervojo trairanta lian bienon, de tiu fervojo kiu ŝajnis al li plugisito produktiganta lian karan monon. La lokomotivoj faradis sulkon sur la vojo, la vagonoj estis la semantoj, kaj li kolektis la rikolton. Domaĝe ke tiom da partohavantoj estis en tiu negoco: la obligaciistoj forĝajnis preskaŭ ĉion.

Laŭrenco sciis ja ke posedo de fervojaj akcioj plej ofte signifas esti mastro de tio kio estas pagota, kaj certe li ne lasus sin fuŝlogi per paperaĉoj de iu ajn alia fervoja entrepreno; sed tiu fervojo estis la lia, ĉiumatene la lokomotivoj diris al li bonantagon, la veturantoj kiujn la vagonaro kondukis oni ne scias kien elkliniĝis al la fenestroj de la vagonoj por rigardadi tiujn kampojn tiel bone kulturitajn pri kiuj fieris Laŭrenco, kaj li sentis inklinon al la vagonaroj, kiujn li konsideris kvazaŭ hejmokonatoj kaj dankis al la veturantoj ke ili eligis siajn kapojn el la fenestro.

Kiu scias ĉu tiuj viroj kaj virinoj kiuj forveturis enkaĝigite, finalveninte, parolis — al parencoj kaj konatoj — pri la bieno de Laŭrenco...

Ĝi estis granda bieno kaj la mastro ŝparis nenion por ĝi. Ĉiujare, kiam li iris Barcelonon por enspezi la kuponojn, li delasis en la urbo ne malgrandan kvanton da mono tie ricevita. De kiam, ĉirkaŭ Aprilo, aperis anonco pri tio kiom oni en Julio donos kiel gajnon de ĉiu akcio, li ekmeditis kiu nova maŝino estos al li plejtaŭga. Kaj li daŭre pripensis tion, kaj kiam li estis decidinta, li reripensis kaj kiam li estis tute pensinta, parolis pri ĝi al sia edzino. Kaj ŝi trovis tion ĝusta, kaj en Februaro, al Barcelono, por aĉeti la ilon.

Kaj Laŭrencon akompanis lia plej aĝa filino: Rozo.

Tiu vojaĝo al la urbo estis la revo de la riĉa kamparanineto; la revo kovita dum tuta jaro. De kiam ŝi atingis la vilaĝon, reveninte el Barcelono, ĉiutage ŝi raviĝis rigardante la irojn kaj reirojn de la vagonaroj, ĉiam kun la sama dezirego ke ili forkonduku ŝin malproksimen, en tiun urbon tiel belan, kie ĉio estas movo kaj ĝojo. Ĉiun fojon kiam la vagonaro revenigis ŝin hejmen, ŝi diris «ĝis revido' n» al la urbo per la samaj vortoj: ĝis venonta jaro! Kaj ŝi diris tion tute malgaja, kaj por ŝi pasadis malgaje semajnoj kaj monatoj. Kiom longa estis por Rozo la somero! Ĉiuj barcelonanoj venintaj en la vilaĝon nur rememorigis al ŝi la sopiratan urbon, kaj ĉar ili estis tiel proksime, ŝajnis al ŝi ke Barcelono estas pli malproksime, ŝajnis al ŝi ke kiel tiuj aliurbanoj, la maŝinoj povos iri al la vilaĝo, kaj la patro de Rozo ŝparos vojaĝojn, kaj ŝi ne povos reiri tien, kie ĉiam estas plej granda festo. Kiel malfruis Kristnasko! Kia malvarmo en la vilaĝo dum la malgajaj monatoj! En Barcelono sendube neniam estis malvarme kun tiom da lampoj ĉiam brulantaj, kaj kun tiom da domoj kaj domoj haltigantaj la blovojn de okcidento:

1 Premiita en la VIaj Internaciaj Floraj Ludoj.

sendube neniu sidis kuntirite apud la fajro, ĉiuj promenis certe en la stratoj sub la suno, tiu suno tiel sinjora kiu ne brunigis kiel la vilaĝa.

La suno! Rozo rigardadis malafable la vintran sunon, kvazaŭ riproĉe tial ke ĝi leviĝis malfrue. Kaj kiam ĝi ekestis pli fruema, kaj Rozo lumblindigis rigardante ĝin, ŝiaj okuloj plenĝojis, kaj ŝi iradis kaj reiradis al la fruktartaro kaj petis al la migdalarboj ke ili rapidu ekflori.

Kaj kiam la branĉaro de migdalujoj ŝajnis bukedo de jasmenoj greftita je rozo, la knabino pasigis multe da tempo sub la florintaj arboj; kaj dum ŝi revadis nur al la sopirata urbo, la suno ludetante, eniĝis deflue meze de l' branĉaro. Kaj sunmakulo falis sur Rozon, kaj ŝi, blindigita, fermis la okulojn. Havis la vizaĝon lentuga kaj la harojn ruĝaj la kamparana knabino; kun fermitaj okuloj, plenbanita de l' suno, kaj apud la florinta migdalarbo, Rozo aspektis kiel kupra idolo sub flora baldakeno.

Kaj kiam en la vagonaro, Laŭrenco kaj lia filino pasis sur tiu sulko, kiun en la bieno faris la lokomotivo, — la granda plugisto, — la knabino ne estis jam tiel kontenta kiel antaŭan tagon, ŝi pensis jam al malgajeco de la reveno. Sed, alveninte Barcelonon, ĉiu malĝojo malaperis, kaj la plezuro esti ĉe la granda urbo forviŝis eĉ la rememoron pri antaŭaj nostalgioj.

Ho, la urbo! Granda homamaso ĉie, la veturiloj kurante kvazaŭ spiritposeditoj, muzikistoj en la stratoj, sonorilbruo ĉiuhore, surdiganta kriado, bruado kiu ne permesis aŭdi la malsilenton de la maro, de tiu senfina vico da ondoj venantaj el malproksime, tre malproksime, el tie kie la ĉielo kliniĝas por donadi al ĝi kisojn. Nenia malĝojo estis en la urbo, ĉar ĉiu ridis kaj ĉiu rapidis kun okuloj brilantaj kaj firma paŝado, ĉar oni vidis ĉie signojn de festo, kaj la promenejaj arboj larmis ligojn de rubandoj el senkolorigita papero, — ĉifonoj de antaŭjara gajeco, — kaj en stratoj kaj placoj regis nova ĝojo. Ĉiu estis riĉa en la urbo: mono abundegis, veluron kaj silkon oni vestis ĉiutage, kaj en la montrejoj de juvelistoj neniam oni revidis la samajn juvelojn de antaŭa jaro. Ĉiu amis en la urbo, ĉar sufiĉe diris tion la rigardoj de tiuj altrangaj virinoj promenantaj sur nekovritaj veturiloj, tirataj de du ĉevaloj kun floroj ĉe l' jungaĵoj. Ĉiu estis amata en Barcelono, eĉ la knabinoj kun lentuga vizaĝo, eĉ tiuj kun ruĝaj haroj!

Kaj kiam vesperigis kaj oni bruligis tiun belan lumilaron, kaj la tempo reveni vilaĝon estis jam proksime, kiel belaj Rozo trovis la ridojn de la homoj kaj la juvelojn de la elmontrejoj, kaj la virinojn rigardantaj kun amaj okuloj! Ho! Se ŝi povus nur pasigi unu nokton en la urbo, en tiu urbo kie oni songis tiel belajn aferojn, kiel tiujn klarigitajn en amrakontoj! Se ŝi povus scii kiel parolas pri amo en la urbo, tiuj kiuj amas la knabinojn kun lentuga vizaĝo kaj ruĝaj haroj!

La urboj estas bonaj nur por nelonga tempo, — Laŭrenco diris al sia filino, revenante sian vilaĝon.

ENRIC DE FUENTES

El kataluna lingvo tradukis

MARIAN SOLA

\*  
\*  
\*

## Devizo "Remember"

En tago printempa de hela ĉielo,  
de ĝojoj vivigaj parfuma maten',  
aperis sur mia vojiro sen celo  
brilanta ruben'.

Belega knabino per ruĝaj koloroj  
vestita ĝi estis; ne gema trezor'.

Vivanta rubeno de miaj fervoroj:  
por vi mia kor'!

Logita de ŝia parfumo, mi restis,  
je hela dianto de ruĝa kolor';  
kaj poste, pro l' vento velkinta, ne estis  
por mi tia flor'.

Kaj koro la mia kvieta ne povas  
restadi, kaj flirtas tra ĉiu ĝarden';

sed floron similan neniam ĝi trovas  
por mia ĉagren'!

JAUME GRAU



## Nova triumfo de Esperanto



IAJ Parizaj samideanoj atingis sukceson kies estontan gravecon ni jam antaŭvidas. La Pariza Komerca Ĉambro akceptis la proponon de la Pariza Grupo enkonduki nian lingvon en siajn komercajn lernejojn.

Tiun proponon la Komerca Ĉambro transdonis por esplorado al la Komisiono por Instruado.

Tre interesaj estas la sciigoj pri la klopodoj kaj laboroj de tiu komisiono kaj ni eltiros la jenajn detalojn el la raporto prezentita de S-ro. André Baudet, en la nomo de la komisiono, kiu meritis esti unuanime akceptata. Bedaŭrinde ni ne povas doni, pro manko de loko, la tutan tekston interesegan de la komenco ĝis la fino. Niaj legantoj pardonos tion, kaj, per la resumo kiun ni faros, komprenos kiel konvinkaj estis la argumentoj prezentitaj.

La Komisiono tuj rekonante la utilecon de lingvo internacia, samtempe estis konvinkita ke tiu lingvo ne povas esti ia nacia, sed nur HELPA lingvo; plue, ke tiu lingvo devas esti klara, facila kaj riĉa je esprimoj por traduki ĉiujn nuancojn de la homa penso.

Ĉu la lingvo Esperanto plenumas tiujn ĉi kondiĉojn? — Por esplori tiun demandon la Komisiono elektis subkomisionon de kvin el siaj membroj por serioze studi la esperantan gramatikon. La subkomisiono trovis ĝin sufiĉe simpla. Por informi sin pri ĝia historio, disvastiĝo kaj prononcado, la subkomisiono interrilatiĝis kun S-ro. Rollet de l'Isle, prezidanto de la Grupo Esperantista de Parizo. La informoj donitaj de tiu ĉi samideano konvinkis la komisionon, precipe tiu rakontante ke per Esperanto anoj el 42 diversaj nacioj bonege interkompreniĝis dum la Antverpena Kongreso kaj ke estis tute neeble ekkoni la naciecon de la parolantoj laŭ la prononcado.

Restis ankoraŭ esplori: ĉu Esperanto taŭgas por esprimi ĉiujn nuancojn de la homa penso?

La subkomisiono ne volante facilanime pritrakti tiel delikatan problemon, rezonis: Se franca teksto tradukita en esperanton kaj retradukita en francan ne estos deformita, oni rajtas diri ke la helpa lingvo havas realan valoron koncerne tion.

La eksperimento estis realigata ĉe la Komerca Ĉambro la lastan 30.<sup>an</sup> de decembro.

Tie ĉi ni publike gratulas la samideanojn kiuj faris tiun laboron kaj de kiuj dependis la sukceso de la eksperimento; ili estis: S-ino. L. F. Cense, S-roj. George Warnier, René Dubois kaj Charles Tiard. Koran dankon al ili.

Tri tekstoj estis elektataj de la subkomisiono je tiel preciza stilo ke eĉ malgranda modifo povis tute deformi la sencon. Ili estis tradukataj esperanten antaŭ la Komisiono per du esperantistoj. Poste tiuj ĉi estis forlasataj kaj anstataŭataj per du aliaj komisiataj retraduki la esperantigitajn tekstojn en francan lingvon.

La rezultato estis preciza. La duobla traduko estis juĝata kiel neniel alia laŭ senco de la tekstoj donitaj por pruvo.

Plue, la raporto parolas pri la Esperantaj Kongresoj, pri la haltigo de la Esperanta movado pro la milito, pri la revekiĝo kaj estonta komerca utilego, kiu jam antaŭvidiĝas.

Interesa konkludo estas tiu kiu diras ke **TIUJ POPOLOJ KAJ TIUJ HOMOJ, KIUJ LA UNUJ UTILIGAS LA NOVAJN PROCEDOJN, ANKAU LA UNUJ RIKOLTOS LA PROFITOJN.**

La 9.<sup>an</sup> de februaro estis legata la raporto de S-ro. Baudet ĉe la Komerca Ĉambro kaj oni unuanime ĝin akceptis voĉdonante la jenajn rezoluciojn:

#### La Komerca Ĉambro de Parizo

- 1.—Decidas, enkonduki la fakultativan instruadon de Esperanto en la komercaj lernejoj;
- 2.—Esprimas la deziron, ke tiu ĉi instruado estu ĝeneraligata en Francujo kaj en la eksterlando, kaj ke la komercaj ĉambroj de ĉiuj landoj, zorgemaj plifaciligi la komercajn interrilatojn, favoru la rapidan disvastigadon de la internacia helplingvo.

Jen estas la kontentiga rezultato atingita de niaj Parizaj samideanoj.

Amikoj: kuraĝe antaŭen!!!

JOAN GILI NORTA

VIII<sup>aj</sup> Internaciaj Floraj Ludoj

## EKSTERORDINARAJ TEMOJ

I.—Premio de Deputita Moŝto D-ro. Narcís Plà i Deniel, konsistanta el 100 pesetoj, al la plej bona verko priskribanta popolan tradicion.

II.—Premio de la Grupo «Semo» de «Ateneu Enciclopèdic Popular»; 25 ptoj. al plej bona traduko de la artikolo de D. Martí i Julià «La Patria Universal».

III.—Premio de la Grupo «Barcelona Stelo»; 50 ptoj. al plej bona teatraĵeto taŭga por propagando.

IV.—Premio de la Societo «Nova Sento»; 50 ptoj. al plej bona versaĵo adaptebla je muziko, inspirita laŭ la «interna ideo». Ĝi devos konsisti el 2 strofoj enhavantaj 12 liniojn ĉiu.

Aliaj temoj kaj premioj estas promesitaj; pri ili ni sciigos per venonta numero de K. E.



## ENLANDA MOVADO

BARCELONA.—La 19.<sup>an</sup> de Februaro okazis en la Grupo «Barcelona Stelo» belega festo, en kiu oni distribuis kelkajn premiojn al la Grupaj gelernantoj de Esperanto partoprenintaj la lastajn ekzamenojn. Estis du premioj el 50 pesetoj kaj aliaj konsistantaj el esperantaj libroj. Antaŭ la distribuo de premioj paroladis kurage la Prezidanto de la Grupo, S-ro. Domènech, kaj S-ro. Dalmau en la nomo de la ekzamenintoj S-roj. Delfi Dalmau, Estanislau Pellicer kaj Josep Grau, profesoroj de K. E. F. Tiu lasta aliĝis telegrame al la festo, el Castelló de la Plana. Post la distribuo diris kelkajn dankajn vortojn la premiitoj F-ino. Esteba kaj S-ro. Durá. Okazis koncerto kaj deklamado de esperantaj poeziaĵoj kaj finiĝis la festo per agrabla lunĉo ĉeestata de 112 fervoraj gesamideanoj el ĉiuj Barcelonaj grupoj, kiuj volis tiamaniere honoro la novajn kunbatalantojn kaj pruvi samtempe la revigliĝon

kaj unuecon de la Barcelona esperantistaro. Multaj eminentaj samideanoj tostis por la progreso de nia movado kaj montriĝis unuanima entuziasmo por la venontaj esperantaj kongresoj en Zaragoza kaj Girona.

En la nomo de K. E. F. salutis ankaŭ la ĉeestantaron de tiu ĉarma kaj intima festo, nia Prezidanto S-ro. Gili Norta.

—La esperanta societo «Nova Sento» en sia lasta ĝenerala kunveno elektis la jenan Direktan Komitaton: Prez.: M. Gil; Vic-Prez.: J. Bolós; Sekr.: F. Pérez; Vic-Sekr.: L. Ferreruela; Kasisto: S. Vives; Kalkulisto: J. Giménez; Bibliotekisto: V. Marín; Voĉdonantoj: M. Peiró, P. Vives, J. Capilla kaj J. Canales.

En tiu societo, la 9.<sup>an</sup> de Marto faris paroladon kun lumbildoj pri «Montserrat» S-ro. J. Gili, prezidanto de «Aplec Excursionista de Catalunya» (1918). Ĉeestis la paroladon multaj gesocietanoj.

—La 20.<sup>an</sup> de marto en la Esperanta Societo Paco kaj Amo paroladis esperante nia konata samideano S-ro. Marià Solà el Terrassa pri «Vivo de mikroboj». Lia flua parolado kaj interesa temo ravis la aŭdantaron, kiu miris kiel trafe oni povas pritrakti medicinon.

Tiu sama Societo pliriĉigis sian bibliotekon per akiro de multaj esperantaj verkoj skribitaj laŭ la Braila sistemo por blinduloj.

—La 14.<sup>an</sup> de marto oni malfermis du esperantajn kursojn ĉe «Libereco kaj Kulturo».

Unuagrada kurso estas gvidata de S-no. Valdepeñas kaj duagradan gvidas S-no. Gumà.

Antaŭ la malfermo S-no. Valdepeñas paroladis pri «Historio de Esperanto» kaj «Kial antaŭenemuloj devas scii helplingvon internacian», kies parolado meritis la aprobon de ĉiuj.

La partoprenintoj de ĵus finitaj kursoj, ekkoninte la bonecon de nia kara lingvo fariĝis ĝiaj tre bonaj propagandistoj.

SABADELL.—La 27.<sup>an</sup> de Februaro, komitatanoj de K. E. F. S-roj. Gili, Claramunt kaj Grau faris paroladojn ĉe «Aplec Esperanta Grupo» celantajn la multnombran aliĝon de la anoj de tiu grava societo al nia Federacio. Oni interparolis amike pri la plej konvenaj rimedoj por nia sukceso kaj subskribis la aliĝilon al nia organizaĵo multaj valoraj kaj karakterizaj membroj de la malnova kaj vigla «Aplec Esperanta Grupo».

GIRONA.—La Grupo «Ĝirona Espero» fervore komencis la unuajn aranĝojn por nia venonta Kongreso, kiuj jam de nun permesas antaŭvidi la grandegan sukceson de tiu esperanta solenaĵo. Tre lerte kaj oportune publikigas artikolojn por propagando de Esperanto en la ĵurnaloj de tiu urbo, nia estimata amiko S-ro. Conrad Domènech, juna kaj inteligenta ĵurnalistino.

## EKSTERLANDA MOVADO

*Germanujo.*—En Munchen, dum lasta Februaro, estis aranĝata esperanta ekspozicio en salono disponigita de la poŝtministerio kaj oni faris kelkajn propagandajn paroladojn. Komenciĝis kursoj, kiujn ĉeestas pli ol 300 gepoŝtofistoj.

*Svislando.*—La registaro de la Ĝeneva Kantono enkondukis Esperanton en la unuagradajn lernejojn. Esperanto estas instruata kiel deviga instrufako. Aliaj kantonoj espereble baldaŭ sekvos la ekzemplon de Ĝenevo.

*Bulgarujo.*—En Karlovo formiĝis la unua oficiala Esperanta Societo de lernantoj, aprobita de la Ministerio de Publika Instruado kaj de la gimnazia profesora konsilantaro. Lernas nian lingvon 150 gimnazianoj. Aliaj kursoj en Deevlen, Postera, Pirdop kaj Varna.

*Franclando.*—La Komerca Ĉambro de Parizo, en kunsido okazinta dum Februaro 1921, decidis enkonduki fakultativan instruon de Esperanto en siajn komercajn lernejojn. Novaj kursoj en Colombes, Le Creusot (en la Urbodomo), Beziers (3 specialaj kursoj por virinoj), Marseille (ĉe la Laborborsso, aranĝitaj de la Intersindikata Grupo) kaj en Saint-Omer.

*Siberio.*—La Societo «Espero», en Vladivostok, fondita en 1897, preparis novajn kursojn kaj estas atinginta la nombron da 2.000 verkoj en Esperanto por sia Biblioteko. Tiu societo ludis gravan rolon dum la mondmilita tempo kiel ĉiurilata centra helpilo por la diversnaciaj Esperantistaj militkaptitoj en Siberio.

*Portugalujo.*—La 1<sup>a</sup> Internacia Foiro de Specimenoj, okazonta en Lisbono, akceptis kiel oficialajn lingvojn la Portugalan kaj Esperanton. La grava revuo «Portugal Comercial e Industrial» enhavas Esperantan Fakon el kvar grandaj paĝoj, precipe dediĉitan al la propaganda de la Foiro. La Lisbonaj grupoj Verda Stelo, Antaŭen, Fratiga Stelo, Esperantista Flegisto kaj Novaj Horizontoj vigle laboradas.

*Britujo.*—Pruvo de la graveco de nia movado en Britujo estas la fondiĝo de novaj Grupoj en: Coatbridge, Fleet, Hotfield, Ipswich, South London, Merthyr, Tydfil, Northampton, Shipley, St. Helen's, St. Rollox kaj Torquay. Dum Pentekosto okazos en Harrogate la XII<sup>a</sup> Brita Esperanta Kongreso.

*Rusujo.*—La lasta Tutruslanda Kongreso de Arto akceptis unuvoĉe Esperanton. Dum la II<sup>a</sup> Kongreso de Komunista Internaciano en Moskvo, la hispana delegito Pestaña, subtenita de kelkaj alilandaj delegitoj, faris al Prezidanto de la Kongreso skriban proponon pridiskuti la problemon pri Internacia Lingvo. La lasta respondis ke la problemo estos diskutita en Plenumkomitato de Internaciano kaj estos metita en tagordon de proksima kongreso.

La antaŭajn sciigojn ni eltiris de la numero Novembro 1920 de «Esperantista Movado», monata organo de Kronstadta Esperantista Societo. Adreso de la Redakcio: Prosp. de Lenin, 30. Kronstadt. Ruslando. Monata abono: 50 rubloj.

*Italujo.*—Kursoj de Esperanto komenciĝis en Florencia, Roma, Trieste, Bologna kaj Verona. Dum venonta Aŭgusto okazos la VI<sup>a</sup> Kongreso de Italaj Esperantistoj en Trento.

*Austrujo.*—Ankaŭ dum venonta Aŭgusto okazos, en Graz, Internacia Katolika Kongreso. En tiu ĉi urbo funkcias la agada centrejo de Internacio Katolika, uzanta Esperanton kiel oficialan internacian lingvon. En pli ol 20 ŝtatoj I. K. havas naciajn direktorojn aŭ reprezentantojn. Informojn pri la katolika esperanta movado petu al la centrejo en Graz, Karmeliterplatz, 5.

*Finnlando.*—VII<sup>a</sup> Kongreso de Esperanta Asocio Finnlanda estas okazonta en Tampere. Kursoj de nia lingvo en Humpvila, Kymi, Mikkel kaj Sortvala.

—Aliaj novaj kursoj ankaŭ okazas en: Deventer, Wormerweer, Zaan-dam, Rotterdam, Haag, Helder kaj Leiden (Nederlando); Gallipoli (Grekujo); Antwerpen kaj Liege (Belgujo).

---

## Oficiala Parto

La deziro esprimita de nia kara federaciano Sro. J. Serrat dum nia lasta ĝenerala kunsido, ke la Konsulta Komitato de K. E. F. organiziĝu, havis plenan efektiviĝon la 20.<sup>an</sup> de marto kaj definitive estis elektitaj ties prezidanto kaj sekretario, al kiuj de nun bonvolos sin turni la federacianiĝintaj grupoj, kiuj deziros kunvoki novan kunsidon por atentigi aŭ konsili la Direktan Komitaton pri neĝustaj labormetodoj entreprenitaj aŭ averti ĝin en okazo de bezono.

Estas al ni tre agrable konstati, ke la vigleco troviĝanta ĉe niaj ĉirkaŭantaj samideanoj, povos instrui nin, kaj samtempe ni estas certaj, ke tiu frata kunlaboranta kaj sankcianta Komitato enradikiĝos la certecon, ke la laboro farata estas ĉies kaj ne flanka.

Kiel prezidanton oni elektis S-ron. Manel Gil, el Esp. Soc. Nova Sento (str. Enna n.<sup>o</sup> 156) kaj kiel sekretario S-ron. K. Segura, el Esp. Soc. Paco kaj Amo (str. Asturias n.<sup>o</sup> 1).

Danke ni ricevis de Societo Nova Sento, 10 pesetojn, por helpi la propagandon entreprenitan rilate la II.<sup>an</sup> Specimenan Foi-ron.—LA SEKRETARIO, S. ALBERICH JOFRE.

---

La nuna numero de «Kataluna Esperantisto», tiel same kiel la pasintaj, estis submetita al la ŝtata cenzuro. Helpis la aranĝon de tiu afero la ŝtata ofieisto S-ro. Luis Santamarina, malnova kaj entuziasma samideano.

## ESPERANTAJ GAZETOJ

ricevitaj en nia Redakcio, publike legeblaj ĉe la legoĉambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

Franca Esperantisto.

Le Monde Espérantiste.

Esperanto-Praktiko.

Itala Esperantisto.

La Marto.

La Semisto.

Germana Esperantisto.

Hispana Esperantisto

Internacia Komerca Revuo.

Esperantista Laboristo.

Kristana Espero.

Vegetarano.

Espero Katolika.

Homaro.

La Esperantisto.

La Laborista Esperantisto.

Portugal Commercial e Industrial (Esperanta Fako).

Ni dankos sendadon de la ceteraj esperantaj gazetoj.

### ANONCETOJ PRI KORESPONDADO

— S-ro. Fausto Mendiri, Cabras, 7, 2.<sup>o</sup>, Barcelona (Hispanujo) p. k. ilustritajn.

— S-ro. Francisco Mesa, Igualdad, 14, tda., Barcelona (Hispanujo) p. k. kaj gazetojn.

— S-ro. Estanislau Pellicer, Gran-Via Diagonal, 367, 1.<sup>er</sup>, 2.<sup>a</sup>, Barcelona (Katalunlando) deziras interŝanĝi popolajn kantojn.

---

---

# POŜVORTARETO

ESPERANTO-CATALÀ  
CATALÀ-ESPERANTO

**Lukse bindita libreto, presita sur bonega papero, enhavanta la esperantan gramatikon kun vortaro Esperanta-Kataluna kaj Kataluna Esperanta.**

La K. E. F. aĉetis ĉiujn restantajn ekzemplerojn (600) de la grava eldono farita antaŭ jaroj, kio permesas havigi ilin por la malalta prezo de Ptoj. 0'50. (Al la Grupoj ni faras 20 % da rabato). Oni sin turnu al nia Administristo, Carme, 30, Barcelona.

---

---